


# LA LAMPIRO

62-a jaro n-ro 171 2021:5



Iom  
da  
Poezio

Ukraina poetino  
Bohdana Jehorova

# Lembrete aos associados

Caros associados,

Vimos informar que houve um reajuste nos valores das anuidades para 2022.

Essa medida visa a continuidade das atividades da EASP bem como a manutenção da sede da associação.

Seguem os novos valores reajustados e aprovados em reunião de 23/10/2021:

**Membro do Interior (MI)** = R\$ 100,00 (mensalmente corresponde a R\$ 8,30)

**Membro Simples (MS)** = R\$ 200,00 (mensalmente corresponde a 16,67)

**Membro Mantenedor (MM)** = 400,00 (mensalmente corresponde a 33,33)

Ficou decidido, no entanto, que, renovando sua anuidade para 2022 até 31/12/2021, o associado poderá pagar ainda com os valores antigos:

**Membro do Interior (MI)** = R\$ 75,00

**Membro Simples (MS)** = R\$ 150,00

**Membro Mantenedor (MM)** = R\$ 300,00

O formulário de filiação para 2022 já está disponível no site da EASP (<https://easp.org.br>).

Se não houve nenhuma alteração nos seus dados pessoais nos últimos 12 meses, não há necessidade de preencher o formulário. Você pode ir direto à página de pagamentos ([https://easp.org.br/asocio/kotizoj\\_2022.html](https://easp.org.br/asocio/kotizoj_2022.html)).

Caso já tenha feito a sua adesão, por favor, desconsidere esta mensagem.

Contamos com sua compreensão,

A diretoria

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: José R. Tenorio

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj*

## easp

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

### Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
easp.org.br | contato@easp.org.br

### Jarkotizo por 2022

Simpla Membro ..... R\$ 200,00

Subtena Membro ..... R\$ 400,00

Ŝtatinterna Membro ..... R\$ 100,00

### Dejoroj:

*(La sidejo de EASP ankoraŭ estas  
fermita pro la sanitara enlanda krizo)*

### Estraro

Prezidanto: Esmeraldo Aparecido Alencar de Lima

1-a Sekretariino: José Roberto Tenorio da Silva

2-a Sekretariino: Sidnéa da Conceição Beall

1-a Kasisto: Maria Conceição Rodrigues

2-a Kasistino: Maria Delza Macabú Jesus

Propaganda Direktorino: Vaka

### Konsilantaro

Audino Castelo Branco kaj José Mauro

Progiante

### Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha de Souza

VORTOJ DE LA REDAKTANTO | VORTOJ DE LA PREZIDANTO 04

NOVEMBRA GASTO: MARKOS KRAMER 05

LINGVAJ RESPONDOJ: -AN KAJ -IST (FRANCISCO S. WECHSLER)I 06

POR VIA MEDITO: LA VOJETO (ELENA PAPOVA) 07

KINO KAJ ALIAJ ARTOJ: MANK (ANNA LOBO) 08

SCENO EL LA VIVO DE LA POPOLO: MIA AMIKO, LA TERORISTO 09

(RAUL CÂNDIDO)

REAGOJ (LETERO DE S-RO ROY MCCOY) 12

IOM DA POEZIO: KONTRAŬTEMPO, FLOROJ (BOHDANA JEHOROVA) 14

RECENZO: ALMANAKO LORENZ 2021 - KLERIGA VOLUMO 18

PRI LITERATURO: LITERATURO KAJ VIVO (FÁBIO FORTES) 19

ESEO: BLINDULO (LESJA UKRAJINKA) 21

ENHAVO

## Vortoj de la redaktanto

Nia revuo transpasis la limojn de nia ŝtato San-Paŭlo, en Brazilo. Danke al la reto, ĝin legas nuntempe homoj el plej foraj mondopartoj. Jen kialo por ĝojo kaj danko!

Tial, ni ricevas nuntempe reagojn de homoj el foraj landoj. Legas kaj sendas siajn kontribuojn samideanoj el orienta Eŭropo, ekzemple. Ni kore dankas! Iliajn tekstojn vi povas trovi en ĉi tiu numero de La Lampiro.

Unu apartan reagon sendis al ni konata Esperantisto Roy McCoy, kiu dum jaroj laboris en la sidejo de Universala Esperanto-Asocio, en Roterdamo. Li sendis al ni fervoran tekston, per kiu li

kontraŭstaras la uzadon de vakcinoj kontraŭ Kovim-19 (reage al artikolo antaŭe publikigita en nia revuo). Laŭ nia opinio, li plene rajtas je sia pensmaniero, kvankam ni absolute ne konsentas kun li. Ni publikigas lian tekston, ĉar ni tute ne timas kontraŭajn opiniojn. Male, ni pensas, ke interŝanĝo de kontraŭaj ideoj estas sana, demokratia kaj civilizita sinteno — kondiĉe, ke oni tenu respekton kaj afablecon inter ni, kompreneble. Ni estas krome certaj, ke niaj legantoj prudente analizos la tutan aferon kaj mem formos sian personan vidpunkton.

Por tio taŭgas kulturrevuo, ĉu ne?

Bonan legadon!



## Vortoj de la Prezidanto

*Esmeraldo Alencar de Lima*

Karaj legantoj de nia revuo La Lampiro:

Ni, estraranoj kaj konsilantoj de EASP laboras por alporti al vi kiel eble plej bone nian agadon, por informi pri nia movado, pri nia bela lingvo. Ni klopodas rajtigi al ĉiuj liberan penson, kun respektemo. Nur malpacon kaj kvereladon ni ne akceptas.

Nia revuo estas rimedo por reciproka renkontiĝo kaj amika intelekta kunvivado, sendepende de malkonsentoj pri detaloj. Mi petas, ke vi vizitu ankaŭ nian retpaĝaron ([easp.org.br](http://easp.org.br)), nian retbutikon ([easp.org.br/libroservo](http://easp.org.br/libroservo)), nian retkanalon “Viva Gazeto” ([youtube.com/vivagazeto](https://youtube.com/vivagazeto)), niajn aktualajn informojn. Mi esperas, ke via amo al nia lingvo instigu vin al membriĝo en EASP, por ke ni havu rimedojn por plua agado por nia afero.

Ni kore dankas, ke vi staras apud ni, kun ni.



# Novembra Gasto

*Markos Kramer*



La gasto de la ĉi-monata kulturkunveno estas la akademiano Markos Kramer, el Dresdeno (Germanujo), kiu prezentos la temon: "Logiko – ponto inter filozofio, matematiko, komputado kaj lingvo".

Oni povos sekvi lian prezentadon la 27-an de novembro, ekde 17h UTC-3, ĉe la kanalo Viva Gazeto de EASP. Post la prelego okazos demandado kun la ĉeesto de la preleginto.

Markos Kramer naskiĝis en 1984 en Bonaero (Argentino) kaj kreskis ĉefe en Germanujo. De 2003 ĝis 2007 li studis matematikon kaj filozofion en Oksfordo (Britujo). De 2008 ĝis 2013 li doktoriĝis en Bonno (Germanujo) pri temo, kiu ligas matematikan logikon kaj komputan lingvosciencan. De 2013 ĝis 2018 li laboris kiel scienca kunlaboranto en la komputoscienca fakoj de la Universitato de Luksemburgo. Ekde 2018 li laboras ĉe la Tehnika Universitato de Dresdeno (Germanujo), esplorante la ligojn inter logiko-bazitaj metodoj por artefarita inteligenteco kaj la efektiva rezonado de homoj.

Li eklernis Esperanton en 2000. Post aktivado ĉe la Germana Esperanto-Junularo kaj TEJO, Kramer membriĝis en la Akademio de Esperanto en 2010. Ekde Januaro 2021 li aldone estas membro de la PIV-teamo, kiu okupiĝas

pri la funda prilaboro de PIV cele al la kreado de PIV-2030. Li verkis plurajn esperantologiajn artikolojn pri diversaj temoj.

Per ĉi tiu prelego li skizos kelkajn bazajn metodojn de la moderna logiko kaj klarigos kelkajn detalojn pri tio, kiel logiko rilatas al tiel diversaj fakoj kiel filozofio, matematiko, lingvoscienco, psikologio kaj komputoscienco.

Logiko estas scienca fakoj kun longa historio kaj kun interesaj ligoj al tiel diversaj fakoj kiel filozofio, matematiko, lingvoscienco, psikologio kaj komputoscienco. Logiko okupiĝas pri la demando, kiaj argumentoj estas validaj kaj kiel esprimi argumentojn en preciza maniero por ebligi kontroli ilian validecon per matematikeca precizeco. Tiucele oni esprimas asertojn kaj argumentojn per formuloj ene de unu el pluraj formalaj lingvoj, kies signifo estas difinita matematikece. Tio ebligas studi asertojn kaj argumentojn en matematikeca maniero kaj komputi per ili. Samtempe oni el filozofia, lingvosciencia kaj psikologia vidpunkto studas la demandon, kiugrade diversaj tiel formaligitaj asertoj kaj argumentoj enhave kongruas kun asertoj kaj argumentoj esprimataj per natura lingvo.

## *Demando*

Por komencanto, regas iom da konfuzo pri la uzado de la sufiksoj *-an-* kaj *-ist-*, se oni celas esprimi, ke homo estas adepto de iu kredo aŭ doktrino. Ekzemple: *kristano* (sed ne *krististo*); *protestanto* (sed ne *protestantismo*); *katoliko* (sed ne *katolikismo*); *spiritisto* (sed ne *spiritismo*); *budhano*/*budhista*; *metodisto* (sed ne *metodismo*); *bahaano* (ĉu *bahaisto*?); *oomotano* (ĉu *oomotisto*?); *mahometano* (ĉu *mahometisto*?).

Nu, ĉu ekzistas ia simpla regulo pri tio, se oni diras, ke Esperanto estas logika, regula lingvo?

## **Respondo**

Ne ekzistas simpla regulo, ĉar la afero estas multfaceta. Aldone konfuzas la situacion influo de la derivado de tiaj nomoj en etnaj lingvoj, kiu estas nek simpla nek regula. Rezulte, en Esperanto oni derivas adeptonomojn kaj doktrinonomojn plurmaniere.

Iafoje el la memstara nomo de adepto oni derivas la nomon de la koncerna doktrino, aldonante la sufikson *-ism-*: *katoliko* > *katolikismo*; *protestanto* > *protestantismo*; *judo* > *judismo*; *mormono* > *mormonismo*; *pagano* > *paganismo*; *framasono* > *framasonismo*. Atentu, ke ĉi tie la vorteroj **on** kaj **an** estas ne sufiksoj, sed simple radikpartoj.

Aliffoje el baza principo de doktrino oni derivas kaj la doktrinonomon kaj la

adeptonomon: *agnostika* > *agnostikismo* kaj *agnostikisto*; *satano* > *satano* kaj *satano*; *metodo* > *metodismo* kaj *metodisto*; *spirito* > *spiritismo* kaj *spiritisto*. Teorie eblus *agnostikismo*, *satano*, *metodismo* kaj *spiritismo*, sendube ĝustaj derivaĵoj; tamen unu el la signifoj de la sufikso *-ist-* estas *-ism-* + *-an-*, kio permesas derivi pli oportunajn nomojn. Krome, la uzado de la paro *ism* kaj *an* okazas eĉ kiam ili estas nur ŝajnsufiksoj, kiel ekzemple ĉe *ateismo*/*ateisto*, kie ja temas pri du memstaraj radikoj. (Persone al mi pli plaĉas *sendiismo*/*sendiisto*, formoj tute regule derivitaj sed bedaŭrinde ne popularaj.)

Aliffoje el memstara doktrinonomo oni derivas la koncernan adeptonomon: *oomoto* > *oomotano*; *islamo* > *islamano*;

*ŝintoo* > *ŝintoano*. Atentu, ke *oomotismo*, *islamismo* kaj *ŝintoismo* signifas ne la doktrinon (kiu havas memstaran nomon), sed ian uzadon de tiu doktrino.

Fine, el la nomo de gvidanto oni derivas la koncernan doktrinonomon kaj adeptonomon: *Budho* > *budhismo* kaj *budhano*; *Bahao* > *bahaismo* kaj *bahaano*; *Mahometo* > *mahometismo* kaj *mahometano* (kvankam *islamo* > *islamano* estas la preferinda derivovojo, pro religiaj kialoj).

Unu rimarkinda escepto estas *Kristo* > *kristano* > *kristanismo*. Teorie oni povus uzi *kristismo*, sed la influo de etnaj lingvoj estas tro forta ĉi-rilate.

Parenteze por scivoluloj: en Esperanto ekzistas aliaj okazoj de dudirekta derivado. Ekzemple, oni kutime lernas, ke el verbo oni formas la nomon de ilo aŭ instrumento aldonante la sufikson *-il-*: *skribi* > *skribilo*; *tondi* > *tondilo*; *tranĉi* > *tranĉilo*; *kovri* > *kovrilo*; *segi* > *segilo* ktp. Sed ne malofte el la nomo de ilo oni derivas verbon: *martelo* > *marteli*; *forko* > *forki*; *kulero* > *kuleri*; *broso* > *brosi* ktp. Simile, oni derivas la nomon de lando el la nomo de la koncerna gento: *portugalo* > *Portugalujo*; *kimro* > *kimrujo*; *ĉino* > *Ĉinujo* ktp. Sed oni ankaŭ derivas la nomon de enlandano el la nomo de la koncerna lando aŭ kontinento: *Brazilo* > *brazilano*; *Ĉilio* > *ĉiliano*; *Aŭstralio* > *Aŭstraliano*; *Afriko* > *Afrikano* ktp.



## Por via medito

La vojeto.

Elena Popova

La vojetoj estas paŝosignoj de multaj homoj, kiuj pasis antaŭ vi. Ili estas rektaj aŭ kurbaj, mallongaj aŭ longaj, puraj aŭ surkovritaj de herbo, kiel la vivo de la homoj. Iuj homoj ne pensas pri tiuj, kiuj paŝis antaŭ ili, ne pensas eĉ pri siaj paŝsignoj, kiujn ili postlasas. Sed unu kurba paŝo estas ankaŭ kurba penso, unu stampo sur iu loko – sendecidemo, unu mispaŝo en la koto – ho, vi ne permesu tion!

Se vi decidus fari vian vojeton, antaŭe pripensu kien kaj kial vi ekiros, ĉu por bono aŭ por malbono. Vi petu helpon, por ke estu rekta via vojeto, ke sur ĝi iru ankaŭ viaj infanoj.

Terparteto, piedpremita, sed skizita de la penso kaj animo homa, ĉu ni memoros vin? Kaj se jes, kiel?

# Kino kaj aliaj artoj

Anna Lobo

## Mank


Originala nomo: Mank (2020)

Direktoro: David Fincher

Aktoroj: Gary Oldman, Amanda Seyfield kaj Lily Collins

Lando: Usono

Tempodaŭro: 131 min



Mi antaŭĝojas paroli al vi pri la filmo kiun mi elektis ĉi-foje. Mi klopodas ĉiam alporti nekutimajn, pensigajn kaj interesajn filmojn, kaj neescepte ĝi ja estas tia. Temas pri usona filmo – Mank. Ĝi merite ricevis multajn indikojn al Oscar-premioj, kaj ĝi estas facile spektebla ĉe Netflix.

La filmo rakontas pri verkisto de filmoj, Herman J. Mankiewicz, dum ellaborado de lia filmo 'Civitano Kane'. Tute nigreblanka kun multe da kontrasto, ĝi havas stilon kiun mi povus diri tre simila al tiu de Machado de Assis - multaj saltoj tra la tempolinio, acida ironio kaj forta metalingvo. Mi klarigu:

Dum la filmo estas multaj saltoj tra la tempo, kio estas interesa por iom post iom kompreni la kadron de la nuno. Kaj interesa rimedo estas la uzado de tajpado de malnova skribmaŝino kaj fari kiel se la filmo mem estus iu filma verko kiam ŝanĝiĝas la scenejo.

La tuta filmo enhavas acidan ironion, ĉefe ĉar ĝi montras la monavidemon de

la studioj de Hollywood de la 30-aj kaj 40-aj jaroj, kiuj ne estis vere litigitaj al la arto mem. Ĝi ankaŭ montras la disfalon kaj vundeblecon de la ĉefa rolo, la senpovecon antaŭ eksteraj okazaĵoj.

La metalingvo estas trajto de stilo, kies karakterizo, ekzemple dum verkado de historio, estas paroli pri ĝi kiel ekstera persono. En tiu filmo tio okazas, pro tio ke estas filmo kiu parolas pri kreado de alia filmo, pri vivo de iu filma verkisto kaj pri la studioj de filmoj. Tial, ofte oni sentas sin kiel en tia etoso, kiu alportas tiun stilon, kiel se oni vidas ion ene de alia ujo, aŭ vidante ion per alies okuloj.

Ne koni multe pri la vivo de nia Mank aŭ pri tiu ora epoko de Hollywood, eble povas iom malhelpi dum ĝia spektado. Tio povus esti bona, sed ne estas nepra. Mi ne konis ion ajn pri tiuj temoj, sed mi sukcesis ĝui la spektadon, koni iom pri la vivo de tiu speciala verkisto Mank, kaj iom sperti la etoson de tiu epoko. Mi indikas al vi spekti tiun admirindan novan filmon de David Fincher. Bonan spektadon, ĝis la sekva filmo!




# Sceno el la vivo de la popolo

Mia amiko, la teroristo.

*Raul Cândido*

Estimataj legantoj, ĉio kion mi rakontas tie ĉi estas vero kaj vi povos kontroli tiujn informojn pere de la reto. Prezentinte la averton, ni eku...

Ni ĉiuj trapasis frenezajn spertojn dum tiu ĉi pandemio, mia patro ne estis escepto, li post jardekoj da laboro ĉe la sindikato de bakistoj ektimis perdi sian laboron. Pro tiuj zorgoj li decidis aĉeti drinkejon, ĉar li jam estis posedanto de tia entrepreno antaŭ trideko da jaroj. Ĉe la fino de 2020 mi estis dum kelkaj monatoj sen laboro kaj konsiderante kelkajn eblecojn rilate al novaj dungistoj kaj entreprenoj, do mi restis libera kaj senprokraste reagis al lia helpopeto prizorgi la drinkejon dum kelkaj tagoj... fakte mi restis kiel kelnero kaj ĉiofaristo de tiu drinkejo dum monatoj! Estis ja amuza sperto kaj mi konis plurajn malsamajn klientojn.



En certa tago ni havis problemojn ĉe fridujo kaj mi estis atendanta la teknikiston. Subite haltis tie iu “nova kliento”, videble handikapulo,

en sia motora rulseĝo, manko de kruroj, kaj ĉe lia kolo estis videblaj tuboj por faciligi la aliron de injektiloj. Tiu ulo preskaŭ sen malrapidigi sian seĝon eniris en la drinkejon kaj haltis ĉe la bilarda meblo, tie li sinĝetis de la seĝo kaj trenis siajn femurojn direkte al la fridujo. Tie li eklaboris preskaŭ sen peti helpon por atingi aferojn. En tiu tago mi multe lernis pri tiu nedubema ulo.

Lia nomo estas Anderson, tamen oni nomas lin “Bugalu” aŭ simple “Bugu”, li suferis kaj suferas pri pluraj sanproblemoj kaj pro tio, laŭ siaj propraj vortoj, li estis entombigita plurfoje. Kompreneble temas pri liaj korpaj partoj kiuj estis demetitaj iom post iom. Li suferas pri renaj kaj koraj problemoj, diabeto, infekto, virusoj ktp. Fakte eĉ Covid suferigis lin. Tamen Buga restas laborema, babilema kaj vere ŝercema persono. Kutime li venis al la drinkejo ne por drinki sed por ludi kartojn.

En iu tago li estis tie sidanta kaj trista, mi ne estis tie tamen oni rakontis al mi ke li estis plendanta pri malfacilaĵoj rilate al iu monpensio, kiun li devintus ricevi de



la registaro kaj kiun li neniam fakte ricevis. Li diris ke unue kuracistoj ne volis subskribi ke li ne plu povas labori pro siaj sanaj malfacilaĵoj, ke li bezonas plendi al iu kuracisto por rigardi lin antaŭ ol decidi, poste la publika sistemo prezentis barojn post baroj por ke li ricevu tiun pension, fine post longa batalo estis decidita la afero, tamen la sistemo prokrastis kaj prokrastis kaj pli ol unu jaro kaj duono pasis. Tiuvespere Buga plendis “Ĝis kiam ili kuraĝos trakti homojn tiel? Ĉu ĝis iu frenezulo aperos tie kun bomboj?”. Jes, vi ĉiuj jam imagas kiel finiĝos tiu historio, ĉu ne?

En tiu sama punkto alia kliento estis tie, nomata Toĉjo. Toĉjo estas neklera homo, helpema kaj bonkora tamen ŝercas iom krude. Kiam Buga diris “Ili vidos, iam mi aperos tie kun bomboj!” Toĉjo tuj reagis kun ridoj “Ĉu vi? Ĉu tiu bonulo kuraĝus?”, Buga silentas, tamen Toĉjo daŭrigis siajn tiklojn ĝis komenco de la punkto kaj en la sekva tago... Mi estis en la drinkejo, mia Patro aperis hazarde kaj restis tie por tagmanĝi kun mi, estis

Foto: diskonigado



*Buga ĉirkaŭata de policianoj*



Foto: diskonigado

*Buga en sia radseĝo kun falsaj dinamitoj*

trankvila kaj suna tago, spite de la malpleneco pro la pandemio, estis ja agrabla tago. Nur unu afereto ekĝenis min, la sono de iu dista polica aŭto kiu alproksimiĝis kaj fariĝis laŭta. Post iom da tempo alia polica aŭto preterpasis, kaj alia, sekve fajrobrigada aŭto preterpasis kaj aliaj policaj aŭtoj, rapide kaj brue. Mi kaj mia patro interrigardis nin kaj fajfis. Poste mia patro ricevis mesaĝon en sia poŝtelefono kaj ekridis, li diris ridetema “Oni diras ke Buga minacas eksplodigi la INSS”, tamen li ĉesis ridi post la sekva mesaĝo, “Ili diras ke li aperas en la televido” diris li levigante direkte al la televidilo. Tra la televidkanaloj li traserĉis ĝis aperis en la ekrano la jena sceno...

De helikoptero la kamerao montris malplenan duvojan kaj larĝan avenuon, ne estis tie la kutimaj aŭtoj, nur la aŭtoj

de polico, fajrobrigado kaj televidkanaloj, unu ambulanco sola estis tie tamen diste. La konstruaĵo de INSS situas je nur du domnumeroj post policejo do la bombo minacus ne nur INSS tamen ankaŭ la policejon mem. Raportistoj asertis ke “partoprenas en tiu operacio GATE - Grupo de Specialaj Taktikaj Agoj, la fajrobrigado kaj Civila Defendo ĉeestas” kaj ke “la viro minacas eksplodigi ĉion kaj akceptas babilo nur kun televidkanaloj”, la spertuloj pri bomboj ekzamenis diste la “aparaton” en lia brusto kaj konkludis ke ne valorus la penon provi perforte eniri, ĉio en tiu aparato kongruis kun vera bombo, koloroj, formoj kaj pozicioj de ĝiaj partoj. La teroristo, nia kara Buga, eĉ avertis al la policianoj “ne pafu min, kaze ke tiu aparato suferos ŝanĝon de premo iu dua parto de ĝi eksplodos”.

Bone, la celo de tiu ĉi teksto ne estas instrui kiel fari neverajn aŭ verajn bombojn, tiajn informojn mi kontrolis poste kun Buga, kiu estas ja inĝeniero kaj vere klera homo, sufiĉos diri ke entute ses

dinamitaj imitaĵoj, kvin dratoj kaj detektilo estis kaptitaj. Estis petita analizo al la Kriminala Instituto tamen surloke mem la policoj trankviliĝis ĉar de proksime eblis percepti ke temas pri nevera bombo.

Dum ni estis spektantaj per la televidilo, ni vere ridis multe ĉar ni certis ke Buga neniam farus malbonon al aliaj homoj, tamen li estis ja kuraĝa por iom fari en tiu situacio. Preskaŭ en la fino de tiu situacio alvenis Toĉjo per sia motorciklo kaj mi komencis tikli lin “Vi scias ke tiu situacio estas via kulpo, ĉu ne?”... fakte mi ankoraŭ tiklas lin.

Buga restis bone, la policianoj petis por havi fotojn kun li surloke mem, dum tiu okazaĵo li vestis sin per T-ĉemizo de fama futbala teamo kaj tiu teamo sendis al li plurajn donacojn, li ankoraŭ furoras surstrate, oni traktas lin kiel famulon, liaj monrajtoj komencis remarŝi kaj, kiel mi aŭskultis, aliaj homoj en pluraj ŝtatoj komencis ricevi prokrastitajn deponojn pro la risko ke agoj kiel tiu de Buga fariĝu modo.



La reta aniĝilo por 2022 jam estas alirebla ĉe



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

<https://easp.org.br>



# Reagoj

Ĉi-sube ni publikigas tekston de S-ro Roy McCoy, konata Samideano, kiu dum kelkaj jaroj laboris en la oficejo de Universala Esperanto-Asocio.

***Kvankam ni absolute ne konsentas kun liaj opinioj ĉi tie esprimitaj***, tamen ni plene respektas lin kaj la rajton, ke ĉiu persono havu siajn proprajn opiniojn kaj povu ilin libere esprimi. Ni tute ne timas kontraŭajn sintenojn, ĉar ni fidas, ke ĉiu leganto de nia revuo estas sufiĉe prudenta kaj kapabla por formi sian propran ideon pri la koncerna temo.

Cetere, estas ĉiam bonvenaj reagoj de niaj legantoj, se ilin vestas respekto kaj kontribuemo. Ni nur esperas, ke tiaj malkonsentoj ne skuu la etoson de reciproka

amikeco kaj toler-emo, kiu devas regi en nia Esperanta medio. Da perforto kaj minacoj jam tro plena estas la mondo!

Koncerne la vakcinon kontraŭ Kovim-19, ni klare asertas nian pozicion:

1. Ni sekvas la indikojn de sciencaj instancoj kaj seriozaj esploristoj, kiuj montras, ke vakcinado estas valora armilo kontraŭ la pandemio;
2. Ni sekvas la indikojn de la Monda San-Organizo kaj de la Ministerio de Sano de nia lando, kiuj rekomendas la vakcinadon;
3. Ankaŭ al tiuj homoj, kiuj eventuale malkonsentas kun ni, ni deziras sanon kaj prosperon, neniel “baton al ilia sano”, fare de la viruso.

***Per ĉi tiuj notoj ni definitive fermas la diskuton pri la temo “vakcinado kontraŭ Kovim-19”.***

## Letero de s-ro Roy McCoy al la redaktanto de "La Lampiro"

Mi havas kontraŭan opinion al tiu de la aŭtoro de la ĉefartikolo en n-ro 169 pri la tiel nomataj kovimaj vakcinoj: La unua injektita (kaj ne vakcinita, ĉar la kon-cernaj substancoj neniel estas vakcinoj, ĉar vakcinoj protektas kontraŭ infektiĝo kaj transdonado kaj tiuj ĉi faras nek unu nek la alian) estu li mem, la aŭtoro Célio Martins, kaj la sekvaj estu Paulo Viana kaj eventualaj aliaj kunlaborantoj ĉe *La Lampiro* kiuj partoprenis la publikigon de tiu ĉi misinformaĵo. Ili meritas tiun baton al ilia sano, kaj ĝuste bato al la sano la injektoj certe estas.

Mi povus pasigi horojn refutante la misdirojn de la aŭtoro, sed mi estos konciza.

Ne okazis "longa batalado" antaŭ la aperigo de la injektaĵoj. Fakte, se la injektaĵoj ne ekzistis antaŭ la apero de la dirata malsano (kiel povas esti), la periodo de ilia kovado estis escepte kaj multe tro mallonga. Ili ne estis normale aŭ adekvate testitaj, kaj fine estis aprobitaj (almenaŭ en Usono) nur por urĝeca uzado.

Ne ekzistas "la" kronviruso. Kronvirusoj estas multaj kaj ordinaraj, kaj la gurde preparolata SARS-CoV-2 estas nek nova, nek aparte escepta, nek "terura". Tio kio estas terura estas la aperta kaj frapa troigado de la kvanto de malsaniĝoj kaj mortoj atribuitaj al ĝi. La paniko priskribita de s-ro Martins estas kreaĵo de la amaskomunikiloj. Povas esti ke homoj malsanas en Brazilo, sed ekzistas neniu pruvo ke tio ŝuldiĝas al SARS-CoV-2.

La pleja helpo kiun iu povas doni al alia dum tiu ĉi "terura sanitara situacio" estas sukcese malkuraĝigi pri akcepto de netestita, danĝera kaj eble mortiga injekto. La nuna dirado ke neinjektitaj minacas al la aliaj estas nuda mensogo, neniel pruvita kaj eĉ ne iel indikita.

Ktp. Se *La Lampiro* estus medicina revuo, oni povus insisti ke ĝi retiru la koncernan artikolon. Sed ĉar temas pri nur Esperanta, eblas nur komenti la misecon. Se oni estas bedaŭrinde lasinta sin injektiĝi, oni almenaŭ ne ripetu la eraron ĉe la estontaj profitodonaj reinjektoj, kaj oni nepre ne permesu ke infanoj estu sane damaĝitaj de ajna kovima injektaĉo.

**Roy McCoy**

oficisto ĉe la CO de UEA 1988-2013

# lom da poezio

## BOHDANA JEHOROVA

\*\*\*

La animon postrestas nek larmoj nek ĝemoj –  
anstataŭe nur estas angoraj poemoj,  
kaj anstataŭ malĝojo - lacec' iometa...  
Ĉar animo graviton neniam suferas,  
ĝi ja estas senpeza, kaj ĝi superteras.  
Jen ĝi estas pasia, jen estas kvieta,  
ne influas ĝin teraj reguloj kaj celoj,  
siaj propraj inspiras ĝin revoj kaj veloj...

Kaj se volos ŝi morti pro sia soleco kompleta,  
kraŝi pluvosimile surteren senkrie -  
rememoros ŝi: estis vi iam ĉi tie...

*Elukrainigis Petro Palivoda*

## KONTRAŬTEMPO

Estu vi mia rev', mia akvo viviga...  
Se ekzistas aferoj en viv'  
klare antaŭvideblaj -  
ili certe al vi ne rilatas.  
Kaj se menso ekzistas,  
nun ĝi dormas kviete,  
la okulojn ferminte plej firme,  
dezirante nenion kompreni.  
Se la koro ekzistas  
(kiel kuploorgano de sentoj),  
petas ĝi lasi ĉion senŝanĝe;  
kaj por ĝi estas bone, kaj mi revas pri amo.  
Sed la tempo ekzistas -  
super ni ĝi potencon posedas,  
aŭ superas ni l' tempon kontraŭe;  
ni per forto de flurapideco ĝin dotas.  
Memorigas ĝi: revo ne estas eterna,  
kaj nek homoj nek vortoj iliaj,  
kaj mi scias, ke pravas ĝi certe,  
sed ne mi bedaŭrinde...

Estu vi kontraŭtempo por ĉiam.  
Dum la vorto poeme eksplodas -  
jam nenio ekzistas,  
krom la revo pri amo.

*Elukrainigis Petro Palivoda*

## FLORO

Kiam la floroj forvelkos -  
vi ne hastu forĵeti ilin,  
aldonu la petalojn al via teo,  
Gustumu la aromon inter aliaj gustoj  
de kampaj petaloj el la paseo.

Aŭskultu, kiel muteco bruas,  
simpleco flirtas per la plej profundaj koloroj.  
Ĉu vi rimarkas?  
Tiu floro estas la plej viva el ĉiuj vivantoj...  
Se jes –  
ekzistas neniu tempa distanco inter viaj koroj.

*Elukrainigis Petro Palivoda*




**Bohdana JEHOVA** estas nuntempa ukraina poetino, pentristino, fotistino. Ŝiaj poemoj estas aperigitaj en pluraj ukrainaj eldonaĵoj kaj esperantaj tradukoj de ŝiaj poemoj - en Ĉinio kaj Turkio. Antaŭ nelonge la mondon ekvidis ŝia poezia libro "Serĉado". Nun Bohdana pretigas poezilibron por infanoj.

**Petro PALIVODA** estas ukraina kaj Esperanta poeto kaj tradukisto, liaj verkoj en la ukraina, la rusa, la germana lingvoj kaj originale en Esperanto kaj tradukoj aperis en pluraj eldonaĵoj en Ukrainio kaj eksterlande. Gajninto kaj laŭreato de multaj ukrainaj kaj internaciaj poezi- kaj tradukkonkursoj. Liaj poemoj estas tradukitaj al la germana, la kroata kaj la itala lingvoj.







# Retbutiko de EASP

## Aktualigo kaj remalfermo

La retbutiko de EASP estas ree funkcia post pli ol unu jaro kaj duono de neaktiveco, sekve de la kronviroza pandemio. Ni profitis tiun halton por aktualigi la programaron de la butiko, kiu nun uzas la kromprogramon WooCommerce sub la blogara mastrumsistemo WordPress.

Se unuflanke ni sukcesis reaktivigi kaj modernigi la butikon, aliflanke ni ankoraŭ ne sukcesis normaligi la limdaton por la sendado, ĉar la mendo-alpoŝtigo dependas de ĉeestaj deĵoroj en la sidejo de la asocio, daŭre fermita al la publiko. Provizore tie okazas deĵoro nur sabate, okazo en kiu oni prenas la mendojn ricevitajn dum la semajno cele al alpoŝtigo ĉiulunde. Tio signifas ke ĉiu mendo, aprobita ĝis vendredo nokte, estou sendita en la sekva lundo. Ni kalkulas je via komprenemo.

Por viziti la butikon, notu la novan adreson: <https://easp.org.br/libroserveo>

Per musklako aŭ fingrumo sur la titolo de iu ajn libro la vizitanto alvenos al montro-paĝo, en kiu eblas iom okulumi dorsflanke kaj interne de la koncerna libro.

Se estiĝos iu dubo pri la funkciado de la butiko aŭ pri iu el ĝiaj produktoj, sendu mesaĝon al Carlos Jorge ([libroserveo@easp.org.br](mailto:libroserveo@easp.org.br)).

# Recenzo

## Almanako Lorenz 2021: kleriga volumo

Almanako Lorenz estas tradicia eldonaĵo en Brazilo. Ĝi estas ĉiujare publikigata jam de jardekoj, fare de Eldonejo Lorenz, brazila entrepreno, kiu sin dediĉas al diskonigo de Spiritismo en la Esperanta medio. La numero en la jaro 2021 estas laŭvice la 41-a.

Aparte vekis mian atenton ĉi tiu volumo, ĉar ĝi estas surprize vast-atera. Ne nur strikte pri Spiritismo temas ĝiaj artikoloj, sed pluraj el ili enhavas eseojn pri filozofio, literaturo, humanismo, eĉ didaktiko kaj turismo. Tio perfekte kongruas kun la ideo, ke Spiritismo celas ĉiujn homojn kun malfermaj mensoj, sendepende de aparteno al tiu aŭ alia religio (aŭ manko de religio). Partoprenis interalie aŭtoroj el Afriko, Irano, Rusujo, Japanujo, krom Brazilo. Bela, ampleksa panoramo, tiel ke la tuta libro fariĝas kleriga kaj interesa.

Kiel ekzemplon, mi citu la eseon sur paĝo 17, kies aŭtoro estas la itala juna intelektulino Sara Spanò: “Forgesitaj vortoj, aktualaj emocioj”. Vere leginda teksto, serioze prinotita, laŭ abunda bibliografio. Temas pri kurioza analizo de animstatoj, surbaze de la emociaj frapoj kaŭzitaĵ de la kronvira pandemio. La esploro kondukas nin al la unuaj jarcentoj de la kristana erao, kiam “similan, stagnan,

*Paŭlo S. Viana*


elĉerpan, depriman sento-gamon rekte spertis kaj detale priskribis Evgrio el Ponto (345-399), monaĥo retiriĝinta dum dek ses jaroj en la egiptan dezerton survoje al spirita perfekteĝo”.

Sekvas citaĵoj de pluraj aliaj pensuloj, kiuj priskribis laŭ variaj vidpunktoj la staton de depresio kaj mensa malvigliĝo, kiu de antikva tempo estas konata de la homaro, en diversaj situacioj. Kaj Spanò konkludas:

“Tamen, eble la kono de tiu fora historio kaj de tiu forgesita vorto povus helpi ankaŭ nin. Relokinte ĉion en sian specifan kuntekston, tiaj konoj povas pliriĉigi nian emocian palettron, plialtigi nian esprimpovon pri nia interna mondo kaj nian kapablon alfronti ĝin, aparte en defiaj tempoj.”

Jen la valoro de saĝaj homoj: en kiaj ajn cirkonstancoj de la vivo, preni al si instruojn kaj ilin transdoni al la publiko.

Da tiaj riĉenhavaj artikoloj troviĝas pluraj en Almanako Lorenz 2021. Eĉ se vi ne estas spiritisto, certe vi bele profitos de la legado. Gratulon al Eldonejo Lorenz!



# Pri Literaturo

## Literaturo kaj vivo

### Fábio Fortes

La lingva kaj kultura esperanto-komunumo ŝuldas sian inaŭguran monumenton al la libreto verkita de Zamenhof en 1887: la konvencie nomata *Unua Libro* (originale titolita *Internacia lingvo*. Antaŭparolo kaj plena lernolibro, unue ruslingve sed en la sama jaro aperanta ankaŭ germanlingve, pollingve kaj franclingve). Prezertante la enkondukajn argumentojn favore al la adopto de tiu internacia lingvo, ĝi enhavis ankaŭ la jam legendajn 16 gramatikajn principojn de esperanto, krom kelkajn aldonajn lingvajn specimenojn. Tiel, spite al ties rimarkindaj mallongeco kaj pragmateco – cetere, por ke ĝi povu plej efike kaj disvastigi la ideon kaj varbi ties unuajn apogontojn – *La Unua Libro* estis signalo de alia inaŭguro: tiu de la internacia literaturo en esperanto, aŭ plej simple, la esperanta literaturo.

Nu, eĉ antaŭ la okazo de la unua viva dialogo en esperanto, la unuaj estontaj esperantistoj, kiuj havis en siaj manoj tiun historian verkon, estis dekomence regalitaj per ses literaturaj elprovoj, tie prezentataj kiel ekzempleroj de la lingvo-potenco: la fama kristana preĝo, la *Patronia*; partaĵo de la unua libro de la *Biblio* tradukita en esperanton (Genezo 1.1-10); modelo de neformala korespondaĵo inter esperantistoj; du originale verkitaĵoj poemoj de Zamenhof – *Mia penso* kaj *Ho,*

*mia kor'* – kaj la traduko de tri germanlingvaj strofoj de Heinrich Heine (1757-

1856). La fakto ke, almenaŭ kvin el tiuj ses tekstoj ne temis pri pragmata, ordinara lingvaĵo, sed eĉis ian poezian aŭ religian sencon, ion diras pri la rolo kiun ludis literaturo okaze de la fondiĝo de tiu lingvo. Alivorte, por esperanto, literaturo gravis ekde tiam.

Nuntempe, komuna opinio ŝajnas ne specialan valoron asigni al literaturo kiel parto de ĉiutaga vivo. Rapideco, samtempeco kaj tuja efikeco supozeble elstaras hodiaŭ kiel ĉefaj virtoj por la ordinara vivagado, tiel ke la longdaŭra okuljetado sur libropaĝojn estas de iuj konsiderata ekstertempa okupaĵo, aktiv-aĵo propra al kelkaj pasintamuloj, nenece aŭ eĉ senutila afero. Tiumaniere, la vera vivo koncentriĝus sur tiuj malgrandaj nigraj ekranoj kiujn ni ĉiam kunportas poŝe aŭ surmane, el kiu elfluas preskaŭ ĉio: la amo, la laboro, la lernado, la amuziĝo, la vivo, la morto. Tre rapide, vivo virtualiĝas, kaj tiel oni akiras senscie novan lingvaĵon kaj novajn valorojn, ne plu kongruajn kun la malrapidema meditado kun libroj, per libroj.



Tamen, literaturo estas pli ol libroj, pli ol bibliotekoj enhavriĉaj, pli ol libro-trezoroj de iu pasinta mondo. Literaturo ne egalas al klera kaj erudicia plonĝo en apartigitan universon da literoj. Same kiel lingvaĵo, literaturo estas homa afero. Oni ne konas homan kulturon sen ĝi: eĉ gentoj, kies lingvoj ne skribeblas, spertas riĉajn kaj buntajn literaturajn kreadojn. La antikva greka literaturo, ekzemple, ofte konsiderata kiel la fonda okcidenta literatura tradicio, konservis plurajn trajtojn de antaŭa nur voĉa poezia praktiko; antaŭ ol legi Homeron, oni plej verŝajne aŭdis rapsodojn kantantajn la aventurojn de Odiseo aŭ de Aĥilo. Do, la plezuro krei kaj malkovri imagajn mondojn per rakontado, per poezio kaj per fikcio ne fermiĝas en libroj, tiu estas eneca kaj ne malhavebla parto de homa psikologio. Krome, imagi estas ankaŭ formo pensi: kreante alternativan – eĉ se magian, ne verŝajnan – vivon, oni povas ne nur eskapi el la brutalaĵoj ĉirkaŭantaj, sed ankaŭ aliperspektive alfronti ilin, ilin komprenante alie kaj, bonŝance, trovante ties solvon. Do, same kiel lingvo estas parto de vivo, ankaŭ literaturo estas.

Eble, kiam Zamenhof estis publikigonta sian *Unuan libron*, kiu fakte ne kreiĝis kvazaŭ per miraklo, sed zorgeme estis elpensata dum longa laborado ekde la frua juneco de tiu elstara pola kuracisto, li eble konsciis pri la fakto, ke la sukceso de la entrepreno dependos ne nur de la praktika taŭgeco de la internacia lingvo de li proponata, nek de ĝiaj apartaj gramatikaj virtoj, sed ankaŭ de ĝia anima, krea kaj homeca potenco.

Literaturo estis do la elpruvo ke Esperanto, malsame kiel aliaj preskaŭ denaskmortintaj lingvaj projektoj, fariĝos homa lingvaĵo: ne nur pro tio, ke la tiama klera eŭropano eble konsiderus respektendaj nur lingvojn kapablajn starigi literaturon, sed ĉefe pro tio, ke Zamenhof celis krei homan lingvon. Homa, vivanta lingvo estas esprimkapabla, per ĝi oni pli ol komunikas informojn, sed ankaŭ sentas, imagas, kreas, pensas, ludas, revas. Tial, Zamenhof ne volis krei tradukmaŝinon, nek lingvilon. Okaze de la dua Universala Kongreso, la kreinto de Esperanto klare kaj pasie evidentigis tion: “Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!” Male, jam ene de sia *Unua libro*, Zamenhof esprimis sian celon per poezia metaforo, li provizis nin per rimarkebla imago:

*Sur la kampo for de l' mondo,  
antaŭ nokto de somero,  
amikino en la rondo  
kantas kanton pri l'espero.*

“Nokto de somero” antaŭas brilan, agrablan mateniĝon, kiam espero finfine eniros la mondon, anoncante ian resaniĝilon al la mondaj problemoj. La teksto, kiu ne hazarde titoliĝas *Mia penso*, esprimis do la fundamentan sintenon kiu akompanos la esperantan historion. La espero, kiu poste nomos la lingvon mem, esprimiĝis ne per ia logika, praktika traktato, sed per poezio. Tiel, Zamenhof volis oficiale malfermi sian penson al la mondo.

# Eseo

## Blindulo

### Lesja Ukrajinka (1871 - 1913)



Devizo: Neniu vidas la animon, kaj ne ĉiuj aŭdas ĝin.

Stranga afero, mi neniam sciis certe, ĉu mi estas blinda aŭ vidanta. Homoj ofte konsideris min blinda, sed ŝajnis al mi, ke mi ja estas vidanta, sed mi ne ĝojis pri tio, ĉar mi ne povis rigardi la sunon. Mi provis rigardi ĝin tra multkoloraj lensetoj kaj foje vidis ĝiajn konturojn, sed kie estis makuloj sur ĝi kaj kie estis pura surfaco, mi ne sciis, la lensetoj konfuzis min, ĉar ĉion respegulis alimaniere. Tuj kiam mi volis rigardi ĉion sen iu-ajn okulvitro, la lumo trapikis miajn okulojn ĝis doloro, la doloro pikis mian cerbon, de la cerbo la deprimo disvastiĝis tra mia korpo, kaj mi fariĝis malsana kaj malfeliĉa. Mi devis forlasi provojn por rigardi la sunon per miaj nudaj okuloj, ĉar mi sciis, ke ĝi povas mortigi min, kaj mi ne plu volis trarigardi tra okulvitroj, ĉar finfine ili frapis min (kaj trege), sed la **sunon** ne montris. Tiam mi volis vidi almenaŭ lumon mem, sen la suno, sed tamen sunlumon. Ho ve, kiel ĝi trafis min! Ĝi simple nur premis la sangajn larmojn. Mi volis rigardi la blankan marmoran statuan en la sunlumo, alte tie sur nepenetrebla piedestalo, ho, ĝi estis tiel bela, ke ĝi ŝajnis jen-jen reviviĝos kaj diros vorton – intertempe miaj okuloj ekdoloris, kaj mi

ne pli longe sciis, ĉu en miaj okuloj estas mallume aŭ ĉu la statuo estas vere kovrita de ŝimo kaj araneaĵoj, kaj mi ploris denove pro doloro kaj kompato. Mi volis rigardi la blankan neĝon kun mildaj nuancoj... ĝi ŝanĝiĝis, ŝanĝiĝis, fariĝis griza, poste nigra – mi ne scias, ĉu nur en miaj okuloj tiel vere estis aŭ ĉu ĝi vere fandiĝis, fariĝis marĉo, nur mi devis plori. Mi volis rigardi arĝente rozkoloran sunsubiran nubon, tiel helan kaj tiel dolĉan, kaj rigardi, kaj ĝi ŝajnis fariĝi eĉ pli rozkolora, sed miaj okuloj doloris tiel terure, ke mi nur tiam ekkonsciis, ĉar ne plu estis nuboj, nur malhelega kaj la morna nokto estis super mi, kaj antaŭ mi, kaj ĉirkaŭe. Kaj tiam ŝajnis al mi mem, ke mi blindiĝis, ĉar tiu nokto daŭris longe, kaj mi vidis nenion, nenion klaran, nenion blankan, nenion buntan, nur nokton... Mi ploris kaj demandis homojn: ĉu mi estas blinda? Iuj ŝultrolevis kaj diris: “Mi ne scias.” Aliaj diris: “Ne pensu pri ĝi.” Aliaj amuziĝis: “Kaj blinduloj vivas en la mondo, estas tiuj, kiuj ne vidis la naskiĝon de la suno.” Mi ekvidis, ke neniu diros al mi **nur** veron, kaj eksilentis.

Mi kutimis kaŝi min en ĉiaj malhelaj anguloj kaj kavernoj, kiam la lumo turmentis miajn okulojn, kaj mi sidis tie sola kaj atendis, dum la larmoj de miaj okuloj haltos foriri, tiam mi reiris por serĉi lumon. Nun mi ne volis tion. Mi ekvolis la kompanion de homoj kiel mi, mi timis esti en soleca angulo, sed mi malĝojis inter sanaj homoj, kaj eble por ili estis malĝoje kun mi.

Kaj mi iris al malsanulejo. Tie mi ekfartis bone. Tie estis unu malsana infano, kiu ne vidis la sunon de la naskiĝo: kvankam oni donis al ŝi esperon, ke ŝi revidos ĝin, sed ŝi ne kredis tiun esperon kaj provis alkitimiĝi al ĝi, por konsenti kun la nokto, sed ofte stumblis en la mal-lumo kaj poste ploris. Foje ŝi longege ludis iom da malĝojaj melodioj (ŝi havis arĝentan harpon, iomete peza por ŝi kaj kun malmolaj kordoj) kaj poste ŝi ploris denove. Kiam mi alproksimiĝis por karesi ŝin, ŝi demandis min duonvoĉe:

— Ĉu vi iam vidis la sunon? kia ĝi estas? mi pensas, ke ĝi timigas, ĉar ĝi brulas...

— Kaj mi pensas same, – mi respondis eĉ pli mallaŭte.

— Ĉu vi vidis la lumon? – la infano demandis.

— Mi ne scias...

— Kiel vi ne scias, vi ja estis vidanto?

— Mi ne scias, ĉu mi estis vidanto.

— Sed vi ja vidis *ion*? — la infano insistis jam incitita – diru, kiel vi vidis?

Mi ekrakontis, kaj poste mi mem ploris pro kompato, kaj la infano ploris pro

miaj larmoj, ĉar ĝi ne *komprenis*, ankoraŭ ne komprenis, *kiel* mi "vidis" *ion*.

Iam ĝi diris al mi:

— Kial vi 'rigardis' tion, kion vi nomas 'blanka'? Ĉu vere necesas 'rigardi'? Eble vi povas 'aŭskulti' ĝin?

Mi silentis, ĉar mi ne povis diri al ĝi: "Nur aŭskulti ne sufiĉas por homo."

La infano plu demandis: "Kial 'vidi', se pro tio doloras la okuloj?"

Mi ne povis diri al ĝi denove: "Pro kio estas la okuloj, se vi ne povas vidi?" — kaj denove silentis.

La infano diris denove:

— Estis al vi ne rigardi tiun "nubon", kiu estis fine, pro ĝi viaj okuloj tiel doloris, – ĉi tie la infano tenere kisis miajn okulojn, trovinte ilin per manetoj, kvankam ŝi parolis kolere, — se vi ne interesiĝus pri diversaj "nuboj", kaj pri iu "blanko", kaj ne "rigardus", vi ja estus sana, kaj nenio dolorus vin, kaj vi ne sidus en la malsanulejo, sed estus hejme kaj laborus.

Mi ne povis diri: "Kaj vi ja sidas en la malsanulejo, kvankam vi neniam "rigardis". Mi nur diris: "Ni laboru ĉi tie, mia infano."

Kaj ni kune teksis korbojn kaj faris ĉiun blindulan laboron, nur mi ankoraŭ estis malsana, ĉio doloris min pro tiuj okuloj, kaj la infano estis ankoraŭ malgranda, tial ni laboris iel ajn.

La infano havis tre delikatan aŭdosen-ton kaj nun aŭdis pro malrapida susuro, kiam mi jam laciĝis pri laboro. Poste

ĝi metis sian maneton sur mian laboron kaj diris: “Lasu ĝin, mi finos vian korbon, ne restas multe da ĝi, tion, kion mi povas fari. Vi neniam scias la limon en la laboro!”

Ĝi ofte parolis kolere, kaj la manetoj dume premis mian manon tre delikate kaj elkore, kaj mi kompatis tiujn bonajn, kompatindajn manetojn pro mia pika laboraĵo.

— La korbo povas atendi ĝis morgaŭ, kaj se vi ne havas vian laboron, pli bone ludu por mi iomete, kaj mi kuŝetos, malpli doloras min dum vi ludas.

Kaj la infano nun alportis sian pezan harpon (tro peza por ŝiaj maldikaj infanaj manetoj) kaj ludis por mi, kaj mia doloro kvietiĝis, kaj mi ne plu songis pri io malklara, ol mi pensis pri kiel la nuboj malaperis, kaj ĉu mi estas blinda aŭ vidanta. Kaj estis tiel bone...

Sed mi bedaŭris, ke ĝi laboris per la manetoj super la peza harpo kaj la malmolaj kordoj, kiuj frotis la veziketojn sur ŝiaj fingroj, kaj aldone ŝi ofte ploris post muzikludo kaj denove demandis min, kio estas la suno, kio estas la lumo, kaj kiel “vidi”, kaj kial “rigardi”; tiuj konversacioj turmentis nin ambaŭ, kaj miaj okuloj ĉiam doloris post ili.

Poste ĝi jam alcutimiĝis ne demandi, sed mi ankoraŭ sciis, kion ĝi pensas pri tio, kaj por mi ne estis pli facile... Kaj ankaŭ al ĝi... Tiam mi petis ĝin ludi kun aliaj malsanaj infanoj (ili pli ofte kaŝludis), kaj mi mem iris al fratino de kompatato, prizorganta min en la malsanulejo.

Ho, ŝi estis por mi vera fratino, karesema, tenera, trankvila, ŝia muzika voĉo helpis min pensi (kune kun mia infan-amiko), ke sufiĉas al homoj nur “aŭskulti”: ŝiaj maldikaj, glataj, kvazaŭ silkaj, manoj donis al mi iluzion, ke mi “vidas” ilin ĝis la fundo de la animo. Kaj kiam ni iradis kune en la ĝardeno – falis sur nin per tenera pluvo, apenaŭ tuŝante la vizaĝon, printempa floro kaj roso de la arboj, kaj la floraj odoroj floris per kvietaj ondoj – mi ofte tute forgesis, ke mi ne vidas kaj ne cerbumis pri tio, ĉu mi estas blinda aŭ vidanta, mi sentis min kiel dum juneco, kiam mi estis tute sana kaj iris en mallumajn nediafanajn juliajn noktojn por aŭskulti najtingalojn en apuda bosko, mi tiam aŭskultis najtingalojn kaj ne pensis kio estas pli bone – tago aŭ nokto. Tiel ofte okazis al mi kun mia fratino, eĉ miaj okuloj ĉesis dolori. Kaj kiam ili tamen ekdoloris pro ial ajn, ŝi diris, ke ŝi scias, kiel kaj kial doloras, kaj demandis pri nenio, nur ŝi metis sian silkan maneton sur miajn okulojn, kaj neniam kun ŝi mia doloro ne atingis sangajn larmojn. Ŝi demandis min pri nenio, sed mi mem rakontis al ŝi multon, ĉion, kion mi volis, kaj tio estis pli facila ol la konversacioj kun mi mem en iu angulo, kiujn mi kutimis fari, kaŝante min de la lumo kaj homoj.

Mia fratino, kiel bone por mi estis kun vi! Vi resanigis en mi ĉion, kion nur homa potenco povus resanigi. Vi kaj tiu kolera kaj bona infano revenigis min se ne al sano (mi ankoraŭ ne scias, ĉu mi estos iam tute sana), do almenaŭ al la vivo, vi liberigis min de tiu furioza

doloro, de tiuj sangaj larmoj. Kaj mi eliris el la malsanulejo en la mondon, ankoraŭ malsana, sed kun iom da espero. Estus longa tempo atendi en la hospitalo resaniĝon: mi ankoraŭ timas rigardi la sunon kaj ne malfermas la okulojn tage por ne rigardi la lumon, sed mi scias, kiam tagiĝas kaj kiam noktas, ĉar iel ruĝiĝas en miaj okuloj kaj foje fariĝas nigre, – ankoraŭ okazas iel malklare, nek blanke, nek grize... io tiel, kiel tagiĝo aŭ krepusko... mi ankoraŭ ne scias, kio ĝi estas, mi ankoraŭ timas rigardi... mi ankoraŭ ne certas, ĉu mi estas iam blinda, ĉar blinduloj kelkfoje sentas kiam tagas kaj kiam noktas. Mi ne kuraĝas malfermi miajn okulojn... sed eble iam mi kuraĝos! Homoj diras, ke mi devas esti vidanto, sed mi ne scias, mi timas scii.

Mi jam delonge ne vidis mian infanon, sed mi aŭdis, ke ŝi kreskis kaj ekesperis sin mem, ne nur siajn parencojn, ke ŝi iam ekvidos. Mi donusal ŝi *mian* tutan esperon, por ke ŝia espero estu klara kaj vera.

Kaj mia fratino... Ho, mi aŭdis, ke ŝi... ne, *pri ŝi* mi ne povas diri tiun teruran vorton, kiun mi ofte diris pri mi tiom ofte. Mi volus scii, ĉu ŝi vere akiris iun okulnan malsanon (en hospitalo ofte estas infektitaj pacientoj – eble mi estis tia?), aŭ nur ŝin influis laceco de la malfacila vivo (ofte okazas). Se temas nur pri laceco, ĝi *devas* forpasi, mi helpos ke ĝi forpasu.

Mi ofte pensas pri ŝi, kaj tiu estas mia revo: mi prenos el ŝiaj manoj pezan,

pikan lambastonon, kiun donis al ŝi bonaj “kamaradoj”, kaj forĵetos ĝin alinter lignaĵojn kaj prenos ŝin sub la brako, kaj ni iros tiel, kiel ni iam promenis en ĝardeno. Ni ne bezonas “almozon”, ni povas ellabori almenaŭ *ion* kaj estos por ni tiel, kvazaŭ neniuj *eskortas* iun, kaj ke ni nur simple *iras* – memstare, apude. Ni iros laŭ vojo, kiun ŝi scias, aŭ laŭ vojo sciata de mi. Ŝi konas la vojon en la arbaro, kaj mi scias apud la maro: kaj tie kaj tie estos brueto kaj libera aero, ni *aŭskultos* kune kaj laŭte diros, kion ni *pensas* pri la arbaro kaj la maro. Ŝi plukos la floron kaj lasos min trinki odoron de la arbara animo (ŝi ankaŭ nokte trovas florojn), mi trovos konketon kaj donos aŭskulti al mia fratino, la “animo de la oceano” bruetas en la konko, kaj tiel ni *aŭskultados* animon. Kiam ni ambaŭ enuos pri la suno, mia infano ludos al ni per sia peza harpo, per la malmolaj, arĝentaj kordoj tiujn melodiojn, kiujn sangaj larmoj transformos en arĝentan roson – ŝi jam ekkreskis, eble, la manetoj plifortiĝis, ŝi estas pli granda kaj ne demandos infane, ŝi ludos kaj silentos, mi scias.

Aŭ eble ni... ni ambaŭ, mi kaj mia fratino, vidos... ni ekvidos *ĝin*... “nian suneton Dian, sanktan!” Sed se ne, tiam almenaŭ *ĝian* lumon, tiam almenaŭ helan koloreton... Kiu vidas pli frue, tiu silentos, por ne impresi la alian, ankoraŭ nevidantan. Li/ŝi silentos, nur iros eĉ pli zorge, kaj kondukos sian amikon eĉ pli konvinkante, kaj lasos amikon *aŭdi* la tutan belecon de la maro, la tutan luksecon de la arbaro, jes, lasos *aŭdi*. Sed



la beleco kaj la lukseco ne estos pli bonaj, ne estos pli luksaj ol la animo, kiun ni ambaŭ aŭskultis kiel nevadantoj. Mi scias tion. Mi ja *ne vidas* ankaŭ vin, mia fratino belega, sed mi *aŭdas* vin, kaj,

certe, mi amas vin pli ol ĉiujn viajn kamaradojn. Mi ne havas lambastonon por doni al vi, sed mi donos *min*, tiel malfortan kiel mi estas nun, – ĉu vi akceptos?..

(1902)

*Esperantigis Viktoro Pajuk*



## Lesja Ukrainka

(1871-1913)

Larisa Kosaĉ, monde konata kiel Lesja Ukrainka, apartenas al la triopo de la ukraina poezio kune kun Taras Ŝevĉenko (1814-1861) kaj Ivan Franko (1856-1916). Ŝi ankaŭ verkis dramojn, socipolitikajn artikolojn. En 1971 aperis ŝia E-poezisa verkaro “Liriko”, kompilita de Nadija Andrianova-Hordijenko (1921-1998). Dum multaj jaroj prozo de Lesja Ukrainka estis preskaŭ nekonata, ofte, pro la politikaj kialoj (ŝi arde kritikis socialismon kaj invadon de la rusa lingvo en Ukrainion).

I. Franko tute prave alte pritaksis la agadon de Lesja Ukrainka, skribinte: “De la tempo de T. Ŝevĉenk-a “Testamento” Ukrainio ne aŭdis tian ardan poezian vorton kiel el la buŝo de ĉi tiu malforta, malsana junulino”.





## Kanalo Viva Gazeto de EASP

<https://www.youtube.com/vivagazeto>

An event poster with a yellow background featuring a grid of binary code and geometric patterns. The EASP logo is in the top left. The text 'SABATO 27 NOV 17h UTC-3' is in the top right. The main title 'Logiko - ponto inter filozofio, matematiko kaj lingvo' is in the center. A yellow box at the bottom left contains a play button icon and the URL 'youtube.com/vivagazeto'. A portrait of Markos Kramer is on the right side, with the text 'Markos Kramer Dresdeno - Germanio' below it.